



Al: Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne), Fakaj Asocioj, la Komitato, Konsilianoj, ILEI, TEJO, listoj kaj unuopuloj

Seminario pri AMO 1

Tiu okazos de la 22a ĝis la 24a de marto, 2014 en Horány, sur insulo en Danubo ĉ. 40 km. de Budapeŝto. Ĝi okazos kun du komunaj tagoj kun Junulara Esperanto-Renkontiĝo (JER), renoma aranĝo de la Hungara Esperanto-Junularo (HEJ). Vidu informojn pri la ejo, atingeblo, kostoj kaj aliĝo ĉe www.jer.hu. Tuj tie aperos ankaŭ skiza programo. Gvidontoj estos Veronika Poór (Hungario), Lu Wunsch-Rolshoven (Germanio), Petro Balaž (Slovakio), Orlando Raola (Usono) kaj Stefan MacGill (Hungario).



UEA disponigas tri stipendiojn de po cent eŭroj por faciligi la partoprenon de potencialaj aŭ nunaj aktivuloj. Tio celas unuavice junajn loĝantojn de landoj apud Hungario, kun limigita pagipovo. La retejo konigos kiel interesatoj anoncu sin. Ni turnos nin al la koncernaj Landaj kaj Fakaj Asocioj por ricevi rekomendojn kaj kandidatojn: ni imagas, ke tiuj aktivuloj poste plenumos funkciojn en tiuj Asocioj, aŭ en lokaj kluboj aŭ grupoj. Kaze de stipendipetoj el Hungario, la disponigita sumo estus malpli, sed eblus akcepti pli da homoj. Kaze de apudlandanoj, cent eŭroj devos sufiĉi por kovri loĝ-, program- kaj vojaĝ-kostojn.

Seminario pri AMO 5

Ni nun povas anonci la kvinan seminarion. Tiu okazos en Fai della Paganella (apud Trento) de la 25a ĝis la 29a de aŭgusto, kadre de la 81a Itala Kongreso de Esperanto. Kunordigos la aranĝon la vicprezidanto de UEA, ĉerpante gvidantojn kaj seminarianojn grandparte el la kongresaj aliĝintoj.



Pliaj seminarioj

Interesiĝoj venis el Brazilo, Pollando kaj Afriko. En la nuna stadio UEA ne havas la fortojn organizi pli ol kvin seminariojn en unu jaro. Restas la tasko difini pli klare la organizan modelon por la seminarioj kune kun praktikaj gvidiloj. Tiu procezo komenciĝos post AMO-1, ĉerpante el la spertoj de tiu aranĝo. Perspektive, tiuj gvidiloj malfermos la vojon al grandparte loka organizado de seminarioj, tiel ke en estontaj jaroj ili povu okazi pli multnombre.

Jen la fino de l'AM'

Kurso 'Esperanto etape'

Intertempe la bildoj de la kvina etapo estas elŝuteblaj ĉe www.ilei-mondo.info en formo konvena por poŝtelefonoj. Laboroj pluiras teknike pretigi la 13an etapon. La artisto nun laboras pri etapoj 22 kaj 23.

Alvoko pri nova trijara kurso en Poznano

Ĉi-jare venos al fino la trijara kursaro pri interlingvistikaj studoj en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando. Septembre, kondiĉe je pli aktiva engaĝigo de UEA, ILEI kaj ESF, povos starti nova trijara kurso. Kiel elemento de tiu plia engaĝigo, ni baldaŭ sendos al vi informojn pri tiu kurso, kaj pri stipendiebloj por studemaj partoprenontoj. Intertempe vidu raporton pri la pasintjara ĉeesta sesio ĉe: <http://sezonoj.ru/2013/10/uam-5/>

La ĉefa retejo de UAM estas nun rekonstruata. Ni anoncos, kiam ĝi estos je dispono.

Resumo de cirkuleroj

Jen resumo de la komunikoj dissenditaj de la sub-teamo 'Movado' en la dua duono de 2013:

Aug 29: atentigo pri frua, avantaĝa kotizado.

Sept 16: taskdivido ene de la subteamo MOVADO.

Sept 24: gazetara komuniko pri la kursoj ĉe UAM en Poznano.

Okt 2: rezolucio de la Monda Tago de Instruistoj en ok lingvoj.

Okt 8: celdifino de la grupo MOVADO.

Okt 15: dokumento AMO-01 pri la celoj de la programo AMO

Okt 16: dokumento AMO-02 kun difino de la Seminarioj Pri AMO.

Okt 29: raporto 2-paĝa pri kunsido kun estraranoj en la CO.

Nov 2: komuniko pri la sepa monato de la ludo RISKO ĉe <edukado.net>

Nov 6: dokumento AMO-03 kun modela dutaga programo por SPAMO.

Nov 19: PDF-dokumentoj kaj PPT prezentaĵo de Fabricio Valle pri la Strategia Plano.

Nov 29: Alvoko por registrado de E-kursoj ĉe nia partnero <edukado.net>

Dec 16: programo de AMO por 2014 (tiam Hungario, Kanado kaj Ĉinio)

En la indikita tago la komuniko iris al la Landaj Asocioj; pliaj sendoj okazis tra sekvaj tagoj, tipe al Fakaj Asocioj, ILEI, TEJO, Komitatanoj kaj konsilianoj de UEA, unuopuloj kaj retgrupoj.


Post malfacila jarkomenco, ni celos dissendi en 2014 komunikojn kun simila ritmo.

2014-01-22 LA cirk.doc

JEN LA PARADO DE L'AM':



Horány, Hungario, marte



Viktorio, Kanado, julie



Siano, Ĉinio, aŭguste



apud Trento, Italio, aŭguste